# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Februaro 2004 MENSUEL/MONATA 75-a jaro, n-ro 2 (1184)

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

ISSN 1163.0442 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


# SAT-ANOJ SEMAS....



*Nia kamaradino el Beogrado, Tereza Kapista (dua de maldekstre en dua vico) gvidis plurajn kursojn de Esperanto en Irano. Por povi tion fari ŝi devis surmeti vualon kiel ĉiuj iranaj virinoj. Pri la problemo de islama vualo kaj laikeco en Francio vidu artikolon, paĝo 19.*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*mi esperas ke ankaŭ en tiu ĉi numero vi trovos sufiĉe varian kaj interesan enhavon. Daŭre mankas al mi materialo . Plian kaj plian fojon mi invitas vin kunlabori kaj sendi al la redakcio interesajn tekstojn. Tamen, mi volas substreki ion. Ni ricevas kelkfoje tekstojn kun proksimuma indiko:* ***"se vi ne aperigas tiun ĉi tekston, mi eksiĝos el SAT".*** *Tia ĉantaĝo estos vana. Neniam ni rifuzis artikolon pro ĝia enhavo krom kiam en ĝi troviĝas insultoj, aŭ ĝi estas stile nekomprenebla. En tiu kazo ni petas la aŭtoron refari ĝin. Ja, krom tio, ĉiu aŭtoro respondecas mem pri la enhavo de la sendita artikolo.*
*Do, mi atendas multan materialon, kio helpos al mi pli facile redakti la venontajn numerojn. Dankon.*

*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55,
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

SATEB
Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio

## JARKONFERENCO 2004 DE SATEB
## 16-18.05.2004
## ĉe Barlaston vilaĝo

Kreŝimir Barkoviĉ, ĝenerala sekretario de la SAT-PK, estos nia gastpreleganto en 2004. Li gajnis "OSIEK-Premion 2002" pro sia tradukaĵo de "7000 tagoj en Siberio" - la temo de unu el liaj du prelegoj. La alia estos "Tri semajnoj en Japanio - sur la spuroj de Lanti".
Por pli bone povi partopreni la diskuton, bonvolu antaŭe legi la libron. La semajnferio estos varia kaj stimula.
Por pliaj detaloj kaj aliĝilo, kontaktu:
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs, ST12 9DG
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278
rete: <wedgwood.college@staffordshire.gov.uk>
Se vi ne bone regas la anglan, kontaktu Anne aŭ Ron (vidu ĉi-sube. Ili estas esperantistoj).

Paralele estos Esperanto-Konversacia grupo por komencantoj - gvidata en la angla. Por pliaj informoj, nur pri tio, kontaktu:
Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ, Britio,
rete: <a.johnson@amserve.net>
aŭ Ron Lynn, rete: <ronsnafulin@aol.com.>
Al unu reprezentanto de ĉiu SAT-LEA-o, SATEB ofertas senpagan restadon nur dum la semajnfino. Pri tio kontaktu Anne aŭ Ron kiel supre.

*KOREKTO*
*Nia kamarado Marteno Bustin atentigas, ke li mem ne estas aŭtoro de la artikolo "Denove la religio" aperinta en novembra Sennaciulo, sed ke li tradukis ĝin el la hispana anarkosindikatista ĵurnalo CNT.*

*La redakcio*

*PAGU VIAN SAT-KOTIZON 2004 !*
*KOTIZTABELO - EN LA LASTA PAĜO*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (ĉ = ĉ, ŝ=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

*FRANCIO*

# LAIKECO KAJ RELIGIOJ EN FRANCIO.

Nuntempe en Francio estas debatoj pri laikeco. Tio devenas de la fakto ke de kelkaj jaroj estas junulinoj kiuj volas en lernejoj surmeti vualon surkapen por respekti islaman dikredon. Niaj lernejoj estas laikaj (ekzistas ankaŭ certaj lernejoj kiuj estas privataj kaj sekvas diversajn dogmojn. Eĉ ili estas mone helpitaj de la ŝtato se ili sekvas la oficialan programon. Tie ili povas havi apartajn kondutojn religiemajn).



*Dum la manifestacio en Francio kontraŭ eventuala nova leĝo. La skribo diras: "Ne tuŝu mian vualon!"*

Do la regulo en laika lernejo estas ne surmeti videblan religiajn insignojn (eĉ politikajn). Tamen, neniu diras ion al tiuj kiuj surmetas etajn juvelojn kiel kristanan kruceton, aŭ signojn de aliaj religioj.

Certaj knabinoj rifuzis demeti sian vualon. La lernejo rifuzis akcepti ilin. La familioj protestis. Eĉ la ŝtatkonsilanto diris, ke oni ne devas malpermesi al tiuj junulinoj iri lernejen pro vualado.

La problemo kuŝas en la fakto ke vualo estas tre videbla signo (foje la junulinoj eĉ rifuzas gimnastiki) kaj oni konsideras ke tiu vualo estas samtempe signo de mallibereco por la virinoj, kiuj estas devigataj de la viroj surmeti tiun vualon. Oni diras ankaŭ ke kiam oni vivas en iu lando, oni devas konsenti kaj alkutimiĝi al la enlandaj kutimoj. Fakte en Francio, ĉiu rajtas havi sian kredon. Sed en laikaj lokoj, oni devas respekti ĉiujn ideojn (eĉ de la nekredantoj). (En Pariza urbodomo estas virino kiu ne surmetis vualon dum sia unua provperiodo kaj kiu tuj surmetis ĝin kiam ŝi estis dungita. Plie, ŝi rifuzas manpremi manon de viroj por saluti ilin. Nuntempe oni ŝin provizore forigis de la laboro kaj estos proceso ĉe labor-juraj instancoj).

Samtempe estas viringrupoj de arab-islam-devenaj knabinoj kiu nomiĝas « Nek putinoj nek subiĝantinoj » kiuj postulas liberecon en la elekto sed ĉefe rifuzas ke oni konsentu pri frekvento de laikaj lernejoj kun vualo surkape. Ili diras ke se oni tion ebligas, tuj oni devigos ilin surmeti tiun vualon eĉ kiam ili malkonsentas.

Grava enketo estis farita de iu grupo de elstaruloj kiuj intervjuis multajn homojn : verkistojn, sportistojn, artistojn, simplajn homojn, politikistojn, juristojn... por havi ilian impreson kaj decidi, ĉu necesas nova leĝo por pritrakti la aferon. Ili fine proponis ke oni faru leĝon, kiu indikus ke neniu videblega signo de religio estu (granda kruco, vualo, vertoĉapo, ktp). Plie ili proponas novan senlaboran tagon por la islama kaj la juda religioj en la lernejoj (al tiu lasta propono, multaj reagas malfavore, estas jam multaj senlaboraj tagoj, kaj lastatempe la regantoj decidis nuligi iun de Pentekosto)

Foje oni opinias ke eble estas tro da bruo ĉirkaŭ la problemo de vualo kaj ke tio instigas al aparte bruaj reagoj. Plie, la problemo de manko de laboro foje tuŝanta pli la arabdevenajn familiojn estas grava. Grupoj de laŭdire, ekstremaj islamanoj alvokas al manifestado kontraŭ tiu leĝo kaj diras ke tio estas atako al religia libereco Eĉ en multaj islamaj landoj estas protestado antaŭ la francaj ambasadejoj kaj en Usono, kiuj nuntempe multe baraktas kontraŭ franca sinteno dirante ke en Francio ne plu estas religilibereco. Ili ne vidas la diferencon inter libera elekto de privata religio kaj la franca sinteno rifuzi ke laika spaco de la lernejo estu loko de religipropagando anstataŭ libera loko en kiu oni tolereme respektas la ideojn de ĉiu. En Francio ĉiu povas havi sian kredon. Nur certaj sektoj estas malpermesitaj (sekto = kiu ne respektas liberecon de iu forlasi la grupon aŭ kiu trudas siajn anojn al malleĝaj aŭ danĝeraj agoj)

Tutcerte la temo estas foje rebatita en la ĉiutagaj diskutoj de multaj personoj kaj oni devos sekvi la evoluon por vidi ĉu tiu leĝo ebenigos aŭ ampleksigos la problemon.

Tereza